

Esperanto-vivo en Svislando, 8-a parto
Elementa kurso programita, 2-a parto: Natureco, artefariteco
Claude Gacond, 397-a radioprelego, 1971.05.19 & 22

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni donis al vi informojn pri nia laboro koncerne al la redaktado de *Elementa kurso de esperanto programita por franclingvanoj*. Ni diris al vi, ke en tiu kurso ni ne nur donas gramatikajn klarigojn, sed ankaŭ alportas prilingvajn konsiderojn. Jen traduko de ĉapitro dediĉita al la temo *Natureco kaj artefariteco*.

A.- « *Dum jardekoj iuj kleruloj faris opozicion inter la franca, lingvo dirita **natura**, kaj esperanto, lingvo dirita **artefarita**. Fakte per tiuj distingoj ili celis senvalorigi esperanton rilate al la franca. Tiu taktiko havis ian sukceson. Diskonigante antaŭjuĝojn malfavorajn al esperanto ĝi bremsis ties disvolviĝon en la franclingvaj landoj.*

Cl.- *Fakte ĉiu lingvo estas **natura** por tiuj, kiuj ĝin flue parolas, kaj pli malpli **artefarita** por tiuj, kiuj ĝin lernadas. Tio koncernas same bone la francan, kiom esperanton.*

A.- *Kaj interne de ĉiu lingvo okazas luktado inter **natureco** kaj **artefariteco**. Por lernanto la parolata lingvo estas pli natura, ol la literatura. Por plenkreskuloj, kiuj ne asimilis la francan ortografion – kaj Dio scias, kiom multaj ili estas – la skribita lingvo restis artefarita lingvo malfacile uzebla.*

Cl.- *Fakte se ni volas fari lingvistike akcepteblan komparon inter lingvoj tiaj, kia la franca kaj kia esperanto, ni ne devas paroli pri **natura** kaj **artefarita** lingvoj, sed pri **neregula lingvo** kaj **planlingvo aŭ reguligita lingvo**.*

A.- *En neregula lingvo la vortaro rezultas el pura hazardo.*

Cl.- *Tiel estas ekzemple pri la metivortoj. Fremdulo devos lerni, ke en la franca oni diras **laitier** kaj **épicier**, sed ne **fromagier** kaj **boulangier**. La akcepteblaj vortoj estas **fromager** kaj **boulangier**.*

A.- *Poste tiu sama studanto lernos, ke se oni diras **un flûtiste** kaj **un pianiste**, oni devas kontentiĝi diri **un tambour** kaj **un trombone**, ĉar la formoj **tambouriste** kaj **tromboniste** ne estas francecaj.*

Cl.- *Jaroj de studado estas necesaj al fremdulo por asimili kaj mastri neregulan lingvon.*

A.- *En **planlingvo** tia, kia estas esperanto, la vortaro ne estas hazardaĵo. Ĝi estis ellaborita kun ia logiko el materialo ekzistanta en la neregulaj lingvoj.*

Cl.- *Centoj da sufiksoj estas uzataj en la neregulaj lingvoj por formi meti-nomojn. El tiu abunda lingva materialo esperanto devis elekti sufikson taŭgan pro ties fleksebleco kaj universaleco.*

A.- **Demando** : *En esperanto, kiu estas tiu unusola sufikso uzata por formi metinomojn ? »*

Cl.- *La lernanto skribe respondas, kaj tuj li povas kontroli la ĝustecon aŭ ne de sia respondo : « Tiu sufikso estas **-ist**. »*

A.- *Aliajn demandojn la lernanto jam renkontis dum tiuj prilingvaj klarigoj. Al ili li devis skribe respondi. Ni ne legis al vi tiujn demandojn por ne rompi la legan unuecon de tiu ĉapitro. Jen kiel daŭrigas tiuj lingvaj klarigoj :*

Cl.- *« Kiel vi rimarkis kun iuj metinomoj, en neregula lingvo, ne estas necese havi rektan rilaton inter nomo de metio kaj la ĉefobjekto de tiu profesio.*

A.- *Ekzemploj :
pano – panisto, **pain** – **boulangier**.*

Esperanto-vivo en Svislando, 8-a parto
Elementa kurso programita, 2-a parto: Natureco, artefariteco
Claude Gacond, 397-a radioprelego, 1971.05.19 & 22

ĉevalo – ĉevalisto, cheval – palefrenier.

Cl.- *En neregula lingvo, kia la franca, la rilato inter metinomo kaj la ĉefa objekto de la profesio povas esti foje komprenata de tiuj, kiuj konas aliajn lingvojn.*

A.- *Ekzemploj :*

abelo – abelisto, abeille – apiculteur. Latino : apis egalas abelo.

birdo – birdbredisto, oiseau – aviculteur. Latino : avis egalas birdo.

fiŝo – fiŝbredisto, poisson – pisciculteur. Latino : piscis egalas fiŝo.

anonci – anoncistino, annoncer – speakerine. Angla lingvo : to speak egalas paroli.

Cl.- *En planlingvo, kie la homo mastras la vortfaradon, estas logike, ke la metinomoj estu formataj el radikoj, kiuj havas rektan rilaton kun la objekto de la profesio. Ankaŭ estas logike, ke tiu rilato ne estu kaŝita al la okuloj de la averaĝa publiko per uzo de tro scienca radiko.*

A.- *Nia komparo inter la franca, lingvo neregula, kaj esperanto, planlingvo, havas nenion mallaŭdan por unu aŭ por la alia el ambaŭ lingvoj.*

Cl.- *Ĉiu lingvo havas propran lud-endan rolon, kiu respondas al ĝia karaktero.*

A.- *Lingvo neregula, kiu respegulas la historion de aparta civilizo kaj estas malfacile lernebla, pro la komplekseco mem de sia vortaro, estas malpli bone pretigita por ludi la rolon de supernacia lingvo.*

Cl.- *Aliflanke planlingvo, kiu evitas la regionismojn kaj reliefigas la lingvajn faktojn komunajn al ĉiuj lingvoj, estas tute certe adaptita al la funkcio de supernacia lingvo. Sed kontraŭe je la loka nivelo ĝi ne havas la guston de regiona idiomato. »*

A.- *Tiel finiĝas tiuj prilingvaj klarigoj koncerne al la temo natureco kaj artefariteco. Ĝin sekvas etimologiaj informoj, kiujn ni legos al vi traduke la venontan semajnon. Tiel vi havos ideon pri la informoj, kiujn ni donas al la gelernantoj.*

Cl.- *Verkante tiujn klarigojn ni celas ne nur komprenigi la gramatikan strukturon de esperanto. Ni ankaŭ volas doni al la gelernantoj de la Elementa kurso de esperanto programita por franclingvanoj plej diversajn informojn historiajn, psikologiajn, movadajn kaj ĝeneralajn, kiujn ili devas koni.*

A.- *Se geaŭdantoj deziras ricevi la unuan ĉapitron de tiu nun eksperimentata kurso, ili ĝin petu skribante al Radio-Svislando. Kaj se ili konas la francan lingvon, resendante al ni la testfoliojn, ili povos ricevi la sekvajn lecionojn.*

Cl.- *Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !*

-oOo-